

1a Jaro - N.º 1a  
OKTOBRO 1937

Direktoro :  
**Pierre DELAIRE**  
dir. de "Esperanto-Oficejo"  
63 rue de Patay ORLEANS (Loiret)  
FRANCUJO

JARABONO  
(12 numeroj)

Francojo ..... 15 fr. fr.  
Aliaj landoj ..... 20 fr. fr.

ANONCETOJ

Unu linio ..... 5 fr. fr.  
Ili devas esti antaŭpagitaj

Komunikadojn, abonojn,  
anoncetojn, kpt. sendu al la  
direktoro, ĉi-supra adreso.

# RADIESTEZA GAZETO

INTERNACIA ESPERANTLINGVA ORGANO DE LA RADIESTEZISTOJ KAJ RADIESTEZO-AMIKOJ — APERAS ĈIUMONATE

## PER ESPERANTO !

Vi ne povus kompreni ke miaj unuaj vortoj sin ne turnas al S-ro Emile CHRISTOPHE, la fama franca radiesteza serĉisto kiu nun publikigas esperantan tradukon de sia unua libro : « Tu seras sourcier ! » (« Estu radiesteza serĉisto »), kaj kiu ebligis la aperon de la unua numero de tiu gazeteto.

Agrable legebla, facile komprenebla, tiu grandvalora verko kiun ĉiuj povas legi, kia ajn estas iliaj

la estuloj kaj estaĵoj ? Tion Emile CHRISTOPHE, kies verko ricevis argentan medalon en Junio 1934, de la Nacia (franca) Societo por Kuraĝigo al Bono prezentas per metodo kiel eble plej simpla, deviganta la konon de neniu speciala scienco kiun la plejmulto ne povas akiri. Li neniun malkuraĝigas, ĉar li ja scias, pro sperto, ke persisti oni devas en tiu radiesteza fako. Li sciigas al ni ke 80 % el la homoj posedas tiun mirindan perceptokapablon, tiun sesan senton, kiu permesas uzi la vergeton kaj la pendolon. Kiu provos ?

Multaj. Sed, mi opinias : ne nur por kaj pro propra intereso, sed ankaŭ por la plibonigo de la Homaro. Ĉu ni ne povas opinii ke la celoj de ESPERANTO kaj de RADIESTEZO estas iomete similaj ? Jes, kompreneble.

Tiu nobla celo, inda je ĉiuj neprofitamaj radiestezistoj, estos baldaŭ, parte, efektivigata en multaj landoj, dank'al « NIA KARA LINGVO ». Tiu traduko estas por ni, esperantistoj, tre grava, ĉar ĝi pruvas unufoje ankoraŭ al la skeptikuloj ke vivas « NIA AFERO » ; Esperanto ne estas mortinta kaj ne intencas morti..

Kaj nun, pri nia gazeteto : mi petas ĉiujn samideanojn (*radiestezistojn aŭ ne* — mi eĉ ne estas sperta kaj lerta radiestezisto —) propagandi nian revueton.

De Vi, Karaj Legantoj, dependas la estonto de nia gazeto. PROPAGANDU la gazeton kaj precipe legu la klaran kaj klerigan libron de Emile CHRISTOPHE.

Pierre DELAIRE,

Direktoro-Fondinto de la gazeto.



Emile CHRISTOPHE

kapabloj kaj sciencaj konoj, klare raportas pri la eblaj aplikoj de RADIESTEZO en ĉiuj fakoj.

Kiu ne aŭdis pri RADIESTEZO, la arto percepti per la pendolo aŭ la vergeto, la radiadojn eligantajn el

## ABONOJ

La abonoj komenciĝas ĉiujare en la monato de Oktobro, tio estas : ĉiu persono kiu abonas post la monato de Oktobro ricevas la antaŭajn numerojn.

## MANUSKRIPTOJ

La manuskriptoj ne estas resendataj. Niaj korespondantoj prenas sur sin la tutan respondecon de siaj

komunikadoj.

La reklamoj ne implikas la redakcion de la gazeto.

Le represo de la artikoloj estas permesata, sed kun indiko de deveno (titolo de la gazeto, numero, prezo kaj kompleta adreso.)

## KORESPONDO

Ni respondas nur al la leteroj enhavantaj unu respondkuponon.

## FREŜDATAJ KAJ PUBLIKAJ EKSPERIMENTOJ DE TELERADIESTEZO (1)

Teleserĉadoj de Abato Mermet (2).

### 1° Retrovita Ringo.

En Bescat, apud Arndy (Basses-Pyrénées), Abato TERRIOUX, pastro de Bescat, fine akceptanta la petojn de parohino, ĉagrenegigita ĉar ŝi perdis sian edziĝringon, en sia ĝardeno, ŝi kredas, skribas al Abato MERMET, sendante al li la planon de la ĝardeno kaj de la domo.

Sinjoro MERMET respondas : « La ringo ne estis perdita en la ĝardeno : ĝi eĉ tute ne estas perdita, mi ĝin sentas (3) en la domo, kaj en tiu ŝranko. » Nu oni esploras la ŝrankon kaj oni trovas tie la edziĝringon, kiu, *tion kredis la bona virino*, estis perdita en la ĝardeno. Tiu lasta detalo estas pensiga, ĝi pruvas ke ne temis, en tiu speciala okazo, pri transsendo de la penso.

### 2° Retrovita Junulino.

Pri la forigo de junulino, en majo 1934, socialista Svisa gazeto, *Le Volksrecht*, lastatempe raportis la antaŭdirojn faritajn de pluraj « Viziuloj », kaj jen tio kio estas presita, en dato de la 4-a de februaro 1937 :

(Traduko) :

« De la eltrovo de tiu abomeninda krimo, kulpita kontraŭ la eta Frida Fohn, interese estas ĉi tie atente prijuĝi la rolon kiun havis la « vizienco ».

« Viziulo, Marion, en Lujera (honorario : 20 fr.), diris : « La etulino vivas » ; li supozas ke ŝi estas fortrenita trans la itala landlimo.

« Pluraj aliaj asertis ke la etulino estas forrabita.

« Alia : 3 semajnojn post la forrabo, ŝi mortis.

« Sortantaŭdiristino ŝin « vidis » promenanta laŭ la bordo de la lago de Zürich.

« Viziulo de Hérisan montris, en Genevo, lokon kie ŝi sin trovas.

« Aliaj asertis ke ŝi estas en la lago.

« Ĉiuj tiuj «viz.» malbone « viziis » !

« Nur unu atingis a tutan veron :

« La 7-an de Majo 1934, Abato MERMET skribis, en franca lingvo :

« La etulino estas mortinta;



« Oni ŝin ne ĵetis en la akvon;  
« Oni ŝin ne mortigis per ilo, sed  
ŝi estis strangolita de malĉastema  
kruelulo.

« La mortigisto estas 1 m  $\frac{1}{2}$  alta.  
« KAJ LIAJ DIRAĴOJ ESTIS AKU-  
RATAJ KONIGITAJ. » (*La Prospection à Distance*, Majo 1937).

(1) La *telerradiestezo* estas la arto  
serĉadi, pervergete aŭ perpendole,  
super plano aŭ super fotografajo.

(2) *Abato MERMET* estis unu el la  
plej famaj (tutmonde konataj) radieste-  
zistoj.

(3) *Sentas* : efektive, *Abato MER-  
MET*, sentis la radiadojn de la ringo,  
per sia sesa sento kiu permesas sen-  
temiĝi je ia estaĵo aŭ persono. Tiu  
sesa sento estas la fundamento de  
Radiestezo kaj de Teleradiestezo.

## NI RAPORTU

Ni estus kontentaj ricevi de kel-  
kaj legantoj la rezultatojn de iliaj  
eksperimentoj kaj samtempe la rezul-  
tatojn de landaj famaj radiestezistoj,  
por konatigi ilin en la tuta mondo...  
radiestezista kaj esperantista.

Aliparte, estus bone por la propa-  
gando ke ĉiuj legantoj, kiuj ĝin pov-  
as, presigu en la naciajn, region-  
ajn, lokajn aŭ esperantajn gazetojn  
kaj revuojn, ian artikolon pri la propa-  
gando de **RADIESTEZO** per **ES-  
PERANTO**, kio elmontras ke la ling-  
vo de Zamenhof **VIVAS** kaj ke oni  
**UZAS** ĝin **PRAKTIKE**.

Ni estus dankaj ke tiuj kiuj faros  
tion sendu al ni unu (preferinde du)  
ekzemplerojn de la gazeto kie aperis  
la artikolo (aŭ eltranĉaĵon) kun la  
esperanta traduko de ĝi.

## FISKAPTISTOJ ATENTU !

Jen rimedo por malkaŝi la eston  
de la fiŝoj. Aŭskultu la voĉon de S-ro  
A. LEROY :

« Se vi havas amikon kiu pendol-  
uzas kaj kiu scias teleserĉadi... li  
plene sukcesos kiel mi tion faris tiun  
someron. Mi notis sur plano de la  
bordo de Aisne, en *Rethel*... la lokojn  
kie la ezoko estis sentata : mi sentis  
li da ili, kiuj, kiam ili estis lokitaj  
sur la plano, decidis min iri al la  
loko. Mi ĉiujn kaptis en la sentita  
loke... »

(El *La Pêche Indépendante*, marto  
1937, 20, Bourse du Commerce, Paris  
(II), Francujo).

## DUORLAN GELON HAVAS « RADIESTEZA GAZETO »

1) Propagandi **RADIESTEZON** per  
**ESPERANTO**.

2) Propagandi **ESPERANTON** in-  
ter la ĉiulandaj **RADIESTEZISTOJ**.  
Por plenumi tiun celon kun plej  
granda sukceso, ĝi bezonas la helpon  
de ĉiuj bonvolaj **ESPERANTISTOJ**  
kaj **RADIESTEZISTOJ**.

« **RADIESTEZA GAZETO** » ne nur  
radiestezistojn devas interesi, sed  
ankaŭ radiestezo-amikojn.

## LA BONFAROJ DE LA TERAPEŬTIKA RADIESTEZO

Ni represigas ĉi tie leteron de  
S-ro Henri PETELAT (Poisy, Haute-  
Savoie, Francujo) al S-ro Emile  
CHRISTOPHE kiu ĝin publikigis en  
sia gazeto « *La Prospection à dis-  
tance* ». (*La radiesteza teleserĉado*.)

La 7-an de Januaro 1936.

Sinjoro CHRISTOPHE,

Unu el miaj amikoj kuŝiĝas je la  
deka vespere, sentante neniun mal-  
saneton. Je la 12-a la doktoro ne  
povis deklari sian opinion. Li faris  
al li pikvundon kiu lin trankviligis  
sed li estis tiel malforta ke li eĉ ne  
povis respondi. La familianoj devis,  
okaze de nova atako, glutigi al la  
malsanulo medikamentojn kiujn la  
doktoro estis lasinta.

Tre rapide sciigita pri kio okazis,  
mi vizitis mian amikon, kaj deman-  
dis al li ĉu li akceptas radiestezan  
eksperimenton; li jese respondis al  
mi. Mi ekserĉis inter la kreskaĵoj  
kiujn oni plej ofte uzas, tiaj kiaj  
tilio, verbeno, mento, meliso, k.t.p...  
Mia pendolo ne akceptis unu. Mi  
provis la artemizion; ĝi estis al mi  
indikata kiel tre favora kaj je forta  
dozo. Mi tuj farigis infuzaĵon kiun  
la malsanulo glutis. Estis la sesa  
matene. Mi diris al li ke mi estas  
certa ke li venos kun mi ludi kar-  
tojn, vespere... Mi ankoraŭ unufoje  
sukcesis, tial ke, je la unua li jam  
deziris leviĝi kaj montris iom da  
apetito. Notinde estas ke la doktoro  
malpermesis ke oni trinkigu al li  
kion ajn, kaj ke la medikamentoj  
kiujn li estis lasinta ne estis indika-  
taj kiel favoraj de mia pendolo.

Se mi sukcesas, tio estas dank'al  
la klaraj kaj precizaj indikoj enha-  
vitaj en via libro « *Estu radiesteza  
serĉisto* »...

## DIVERSAĴOJ

**EKVILIBRO**. S-ro D. CHICCA, inge-  
niero (Bordeaux, Francujo) malekvili-  
brigiĝis ĉiam je la sama loko de sia ŝtu-  
paro. Esploro farita per la pendolo,  
permesis al li eltrovi, sub tiu loko, sub-  
teran fluton kiu kaŭzis de longe tiun  
akcidenteton.

**GRAFIKA VIDO**, F-ino R. DESACHY  
(Norda Francujo) skribis al S-ro  
CHRISTOPHE por diri al li ke, kiam  
ŝi estis 14 jara, por prepari ekzamenon,  
devis fari malfacilan desegnaĵon kaj  
nenion desegni pro nescio kiam su-  
bite ŝi vidis, sur la papero, la dese-  
gnaĵon per pli blanka koloro ol la fo-  
lio; ŝi nur bezonis superdesegni per sia  
kraĵono. Post kelka momento, ŝi  
nenion plu vidis. Feliĉe, ŝi preskaŭ  
finis la superdesegnaĵon.

**PERDITA...** kaj **RETROVITA**. S-ro  
H. Saxer, la eminenta prezidanto de la  
Geneva Societo por radiestezaĵ studoj,  
ĝuste indikis, sur karto de Salève (je  
la 25 milona), la punkton kie S-ro Paul  
GIBAUD, 19 Rue Caroline en Genevo,  
perdis sian poŝhorloĝon, ŝkigitante la  
9-an de Februaro. Dank'al la indikoj  
de S-ro SAXER, S-ro GIBAUD retrovis  
sian poŝhorloĝon la 16-an de Februaro.

## NI TREMU... KAJ RIDU ! Pri kanibaloj.

Misiisto DUPEYRAT rakontas je-  
non : Antaŭ nelonge — de kelkaj  
semajnoj grava ĉiutaga gazeto de Pa-  
rizo publikigis, kun grandaj titoloj,  
« romanon de dramaj aventuroj, tra-  
vivitan de sia ĵurnalisto speciale sen-  
dita en Nova-Gineo ». La raporto  
titoliĝis : « En la neesplorata rifuĝejo  
de la lastaj kanibaloj ».

Okazis al mi legi kelkajn el la  
aventuroj de la ĵurnalisto. Tio estis  
por mi tre amuza, tial ke mi vivis  
kelkajn en tiu rifuĝejo. Iam, eĉ, mi  
sincere ridis pro tio. Tio estis kiam  
mi malfermis la numeron de la 1-a de  
novembro 1934. Belega nigrolo, so-  
vaĝa, terura, tie staris, antaŭ miaj  
okuloj, sur fotografajo pli ol 15 cen-  
timetrojn alta. Abomeno ! lia dekstra-  
mano tenis per la hararo homan  
kapon freŝe tranĉitan. Kaj la rapor-  
tisto daŭrigas, sub la titolo : « *Sensi-  
mila klišo* » kio sekvas (mi citas lau-  
vorte). « Post kiam la patrolo estis  
enirinta vilaĝon, kies loĝantoj alve-  
nis de malgranda ekskurso, kies celo  
estis enriĉigi la kolekton de la kra-  
nioj de la tributo, unu el la ĉasantoj,  
volonte akceptis la postulojn de la  
fotografajo. Li eĉ pozis kun la kripli-  
gita kaj sanga trofeo kiun li tenis en  
sia dekstra mano kaj tia kia ĝi estas  
ĉi tie represita. »

Komprenoble, tio sufiĉas por iomete  
tremi.

Sed, ni estos rekompencitaj por la  
penoj. Ni preferu demandu al la fama  
radiesteza serĉisto, *Abato MERMET*,  
kion li opinias pri tio. Tamen, ĉar li  
probable ne respondos niajn leterojn,  
mi preferas ĉion tuj malkaŝi. Antaŭ  
jam longa tempo, tiu fotografajo de  
la kanibalo estis prezentata al *Abato  
MERMET* (ĉar, senutile estas kaŝi  
pli longatempe ke tiu fotografajo estas  
almenaŭ dekjara...)

La fama radiestezisto ĝin kondi-  
deris kaj li ankaŭ estis tuj tremonta,  
kiam oni diris al li, inside, kaŝmalice :  
« Diru, kara amiko, kiu povas, per  
la pendolo, malkaŝi eĉ la seksojn.  
ĉu vi bonvolus trovi ĉu tiu kapo kiun  
tenas la kanibalo en sia mano estas  
tiu de viro aŭ de virino... Oni tion ne  
tre facile diferencigas. »

La serĉisto promenis sian pendolo-  
lon super la funebra kapo.

« Ĝi estas el ligno », diris li, kaj li  
pravus. Aŭ preskaŭ. Tiu « kripligita  
kaj sanga trofeo » ne estas alia aĵo ol  
*simpla*. — *klere skulptita kokosopig-  
lando* kaj la terura kanibalo estas  
nur brava indiĝena gendarmo.

Oficulo de la registaro, por amu-  
ziĝi iomete, aŭ por miregi siajn ami-  
kojn, estis imaginta tiun scenigon kaj  
li ĝin estis fotografinta... »

*Missions Catholiques* (n<sup>o</sup> 3.217,  
1-2-35).

## INTERESA SUKCESO

BlAmont, 23, V. — La juna Marcel  
Thiryvilhem (12-jara) kiu estis for-  
ginta el sia patra hejmo estis retro-  
vita dank'al la precizaj indikoj de iu  
radiestezisto. Notinde estas ke ĉiaj  
aliaj serĉadoj estis malsukcesintaj.



**PEREIGAJ ONDOJ**

S-ro Paul CROISET, 7, rue de la Ravinelle, Nancy, Francujo, skribas jenon en *La Prospection à distance* (Aŭgusto 1937) :

« Inter la miloj da spontaneaj radiestezaĵaj okazintaĵoj kiujn mi havis de malpli ol unu jaro, mi nur citos la kvar sekvantajn, tiritajn el du, kaŭzitaĵoj de la pereigaj eligoj :

« I. — La 4-an de majo 1936, mi sidigas en kafejo proksima de la stacidomo de Toul. Preskaŭ tuj mi sentas ke mi troviĝas sub la influo de pereiga radiado kaj mi devas forlasi mian sidlokon por instali min ĉe la alia flanko de la salono. Unu el miaj amikoj, al kiu mi estis rakontinta tiun aventuron, esploreme sciigis pri tio : la unua loko kie mi sidis troviĝas supre de la kloaktubo de la domo.

« II. — Iun tagon en la lasta somero, apenaŭ sidanta en Nancy'a restoracio, mi sentas, per malagraba maniero, ke pereiga radiado efikas kontraŭ mi. Mi ŝovas flanken mian seĝon por meti min ekster ĉia kapto, kaj, ne leviganta, nek alloganta rigardon, mi trovas, pernenio en la mano, la pereigan fluegon en ĝia tuta trafuo de la salono; mi trovas alian, paralelan, kelkajn metrojn pli malproksime. Mi sciigas al S-ro L..., la estro, tion kion mi trovis, dirante al li ke tio estas kaŭzita de subteraj fendoj. Li ne aspektas tre konvinkita ĉar li neniam aŭdis pri pereigaj ondoj. Sed, du aŭ tri monatojn poste, li diris al mi ke mi pravas : kaviĝo estis okaziginta la duan pereigan fluegon, kaj sondado farita kun bonŝanco estis konstatiginta la ekziston de la fendo. »

*Pro manko da loko, ni ne povas publikigi en tiu numero la du lastajn okazintaĵojn de S-ro Paul Croiset. Sed, ni publikigos ilin en la venonta numero.*

La plej malkara, kvankam la plej riĉenhava el ĉiuj monataj esperanto-gazetoj estas

**NIA GAZETO**

absolute sendependa organo eldonata de la franca ĉiutaga ĵurnalo « Eclaircur de Nice »

Direktero : Georges AVRIL  
Petu senpagan provekzempleron !

**NIA GAZETO**  
29, Avenue de la Victoire, 29  
NICE (Francujo)

**LEGU SENPROKRASTE**  
**LA ESPERANTAN TRADUKON**  
**DE LA INSTRUA VERKO**  
de Emile Christophe

**DONACOJ**

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE estas ĉiam bonvenanta. Vidu la anoncetojn.

**DEDIĈO**

La tradukinto de « Estu radiesteza serĉisto » dediĉis sian tradukaĵon al Sinjoro Marcel-Daniel DUPUIS, ĝenerala sekretario de *Internacia Scienca Asocio Esperantista*, pro la utilaj kaj eminentaj sugestoj faritaj al li por la esperantigo de vortoj de radiestezaĵis nun ne troviĝantaj en la vortaroj kaj pri la traduko de teknikaĵoj.

**NEKROLOGO**

**Abato Mermet.**

Kiam ni enpaĝigas tiun unuan numeron, ni ekscias doloregan novaĵon : tiun de la morto de nelacigebla kaj eminenta Pioniro de Radiestezo kaj de Teleradiestezo, **ABATO MERMET.**

Ni prezentas al la familianoj de bedaŭregata Abato Mermet nian plej sinceran kondolencon kaj sciigas nian legantaron ke ni raportos, en nia venonta numero, pri la vivo kaj pri la verko de la fama mortinto.

P. D.

**TU SERAS SOURCIER.** — (Estu radiesteza serĉisto) de Emile CHRISTOPHE. Afrankite, Francujo : 28 fr. fr. Aliaj landoj : 30 fr. fr.

**APOLOGIE DU SOURCIER** — (Apologio de la radiesteza serĉisto) de Emile CHRISTOPHE — Verko pri teleradiestezo — Teleserĉado super plano kaj super fotografajo — Serĉado de la forĝintoj. Homeopatio. ktp.

240-paĝa libro — Afrankite, Francujo kaj kolonioj : 32 fr. fr. Aliaj landoj : 34 fr. fr.

Tiujn du librojn, franclingve verkitajn, mendu al la direktoro de « Radiesteza Gazeto. »

**DUSAUSOY**

**JUVELISTO**

korespondas en

**ESPERANTO**

en Ĉiuj landoj de la mondo

41, Boulevard des Capucines

**PARIS**

**ESPERANTO-OFFICE**

(Esperanto-Oficejo)  
Francujo.

**« ESTU RADIESTEZA SERĈISTO »**  
de Emile Christophe.

Esperanten tradukis (el la franca lingvo), Pierre DELAIRE. — Libro 222-paĝa.

*Enhavo.* Kiamaniere oni uzas la vergeton kaj la pendolon. Nova metodo. Malsanoj kaj sanigoj. — Veterinara medicino.

Prezo afrankite : Francujo, 32 fr.fr.  
Aliaj landoj : 34 fr.fr.

**DU VERKETOJ DE PIERRE DELAIRE**



*L'Esperanto en douze leçons* (Esp. en 12 lecionoj) — Oportuna franclingva lernolibro. Prezo : Francujo : 6 fr.fr. Eksterlando : 7 fr.fr.

*Tu seras Espérantiste !* (Estu Esperantisto !) — Franclingva varbbruŝuro dediĉita al S-ro Jean Zay, franca Ministro por Nacia Edukado. — Prezo : Francujo : 5 fr. fr. afrankite. Eksterlando : 6 fr. fr.

*Ĉiujn mendojn sendu kun mono al S-ro Pierre DELAIRE, dir. de Esp. Oficejo, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret), Francujo.*

**ANONCETOJ**

Unu linio : 5 fr. fr.  
Ili devas esti antaŭpagitaj.

**PENDOLO EMILE CHRISTOPHE**, duoble uzebla, por la radiestezaĵaj kaj teleradiestezaĵaj serĉadoj. Oportuna kombino de malpeza pendolo (10 gr.) kaj de peza (70 gr.) en unu sola pendolo. Prezo afrankite, Francujo : 27 fr. fr., aliaj landoj : 30 fr. fr. Sendu mendojn kun mono al S-ro Pierre DELAIRE, dir. de *Radiesteza Gazeto*, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) Francujo.

**PENDULE MAGIQUE** (Magia pendolo), franclingva verko de Sinjorino DE MERSEMAN. Du libroj — Unua libro, afrankite, Francujo : 12 fr. fr. Aliaj landoj : 14 fr. fr. Dua libro : (supera kurso), afrankite, Francujo : 10 fr. fr. Aliaj landoj : 12 fr. fr. Faru la mendojn al S-rino DE MERSEMAN, en *Saint-Léger-aux-Bois*, apud Ribécourt (Oise) Francujo.

S-ro Max DELAIRE, 19 1/2 jara, dez. koresp. kun geesper el ĉiuj landoj. Adr. : 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) FRANCULO.

S-ro Jean AUBIER, bankoficisto, 36, Venelle du Ponceau, Orléans (Loiret) FRANCULO dez. koresp. kun intelekto de U.R.S.S.

S-ro K. BERNSTROM, Klingsta Gard. Danderyd. *Svedujo*, emas korespondi kun alilandanoj de ĉiuj aĝoj.

**ABONU TUJ**

**« RADIESTEZA GAZETO » N**



# AU BON MARCHÉ

MAISON A. BOUCICAUT  
PARIS

JE EGALA PREZO  
SUPERA KVALITO

Ĉi tiu anonco aperis en ĉiu numero de *Radiesteza Gazeto*. Ĝi estas transprenita nur unu fojon en la pdf-dosieron.





1a Jaro - N.º 2a  
NOVEMBRO 1937

Direktoro :

**Pierre DELAIRE**

dir. de "Esperanto Oficejo"

63 rue de Patay ORLÉANS (Loirel)  
FRANCUJO

JARABONO

(12 numeroj)

Francujo ..... 15 fr. fr.  
Aliaj landoj ..... 20 fr. fr.

ANONCETOJ

Unu linio ..... 5 fr. fr.  
Ili devas esti antaŭpagitaj

*Komunikaĵojn, abonojn,  
anoncetojn, kpt. sendu al la  
direktoro, ĉi-supra adreso.*

# RADIESTEZA



# GAZETO

INTERNACIA ESPERANTLINGVA ORGANO DE LA RADIESTEZISTOJ KAJ RADIESTEZO-AMIKOJ — APERAS ĈIUMONATE

1

2

3

## NIAJ PIONIROJ

### Mortinta Abato Mermet

En nia lasta numero, ni sciigis nian legantaron pri grava perco ĉe la radiesteza movado. Temas pri la morto de la plej eminenta pioniro kaj reprezentanto de *Teleradiestezo*, Abato Alexis Mermet.

En tiu okazo, ni opinias utila kaj morale deviga laŭtaŭge funebri la famulon.

Abato Mermet estis franca, respektinda kapelpastro kaj mortis, post grava operacio, la 7 an de septembro 1937, en *Jussy*, apud Genevo. Lia patro estis bonega fontoserĉisto kaj Abato Mermet heredis tiun sciencan kapablon kun plej grandaj merito kaj indo.

Neeble estas raportitaj ĉi-tie ĉiujn servojn faritajn de Li por Radiestezo : multnombrajn eksperimentojn, pendolajn aŭ pervergetajn, ĉiam tre bone sukcesantajn kaj ankaŭ ĉiam akompanatajn de sincera modestececo, kio pliiĝas la moralan valoron de liaj senĉesaj laboroj.

Preskaŭ samtempe (en 1930-1931) kiam Abato Mermet publikigis « *Le Pendule Révélateur* » (*La Malkovrantita Pendolo*'n), S. ro Emile Christophe eldonis siajn unuajn radiestezaĵajn laborojn en *Tu seras sourcier!* (*Estu radiesteza serĉisto*) kiun mi esperanten tradukis por tutmonda konatigo de la verko. Pri tiu unua verko de Emile Christophe, Abato Mermet skribis en februaro 1935, laŭdplanan kaj pensigan leteron al la aŭtoro.

Elokventa estas la cifero kiun atingas la nombro da venditaj libroj « *Comment j'opère...* » (*Kiamaniere mi eksperimentas...*) de Abato Mermet : pli ol 30.000. Tio sufiĉas por montri kiom majstra estas la verko de la bedaŭregata klerulo.

Multon ni povus aldoni pri la intelekta kaj morala kapabloj de Abato Mermet. Sed, la elekto estas vere tro malfacila kaj mi timas esti en tio ne sufiĉe kompetenta.

Tamen, mi povas aserti ke restos eterne la nomo Abato Mermet en la *Teleradiestezo*-historio.

Multajn amikojn kaj kunlaborantojn Li lasis surtere, inter kiuj troviĝas Verkisto Emile Christophe kiu skribis en *La Prospection à distance* tiun simplan, sed esprimoplenan frazeron : « mi perdas amikon... ».

Mi ne scias ĉu Abato Mermet estis ano de Esperanto (tion mi provos scii por *Radiesteza Gazeto*), sed mi povas diri : en 1917 kaj 1937 (20 jaroj da distanco) foriĝis el la Homaro du famuloj, Zamenhof kaj Abato Mermet.

Efektive, la unua plibonigis la Homaron per sia morala lingva senbarigilo, kaj la dua plifortigis ĝin per siaj plej kleraj sciencaj konoj kiujn ni heredas.

Pacon kaj Lumon al Lia Nobla Animo !

PIERRE DELAIRE,  
Direktoro-Fondinto  
de Radiesteza Gazeto.

Le represo de la artikoloj estas permesata, sed kun indiko de deveno (titolo de la gazeto, numero, prezo kaj kompleta adreso.)

..

## KORESPONDO

Ni respondas nur al la leteroj enhavantaj unu respondkuponon.

**LEGU SENPROKRASTE  
LA ESPERANTAN TRADUKON  
DE LA INSTRUA VERKO  
de Emile Christophe**

## PSIKOMETRIO (1)

*Si estas ŝtelistino...*

*Sinjoro Armand Breye, 69, rue Marceau, Sin-le-Noble (Nord) Francujo, skribas la jenan artikolon en la oktobra numero de LA PROSPECTION A DISTANCE.*

Iam — antaŭ dekkvino da jaroj — mi malkovris la Psikometrion. Aliaj, evidente, estis farintaj tiun eltrovon antaŭ mi, sed mi tion nesciis.

Emile Christophe, en siaj verkoj : *Tu seras sourcier!* (*Estu radiesteza serĉisto!*) kaj *Apologie du sourcier* (*Apologiado de la radiesteza serĉisto*), facile elmontras, klare, nediskuteble, la rolon de la eliĝaĵoj, ondoj kaj radiadoj. Kion li diras pri la foto, kiu konsistigas, konsiderata kiel « atestilo », grandegan dokumentaron, maldandoneblan *curriculum vitae* (2), estas absolute vera.

Iun tagon, ni estis legintaj, plurope : « *Sens et sensibilité* » (*Sento kaj sentemeco*'n) de Hellen Keller. Ni estis pro tio kvazaŭ humiligataj. Vidi... kaj nenion scii el tio kion sciis tiu juna blinda virino! Flari florbukedon, kaj povi, same kiel ŝi, nomi ĉiun el ili... Povi, same kiel ŝi rekonii la vizitantojn... per ilia « odoro » ; kaj kion plie ?

Mi sciis ke mi estas dotita de speciala sentemeco. Mi parolis pri tio nur timeme al fideblaj amikoj. La homa respekto, la timo de la ridoj, silentigis min plej ofte. Sed, post tiu legado, mi parolis pri tio pli kuraĝe, kaj mi faris konvinkan kaj gravan eksperimenton.

Iu donis al mi iun foton por ĝin atente esplori. Mi ne devis rigardi la foton. Tiun kion mi havis en la manoj, mi ekzakte priskribis, kiel reprezentanta junulinon, 23-jaran, beletan brunan, bonfartantan, rideman, bonvivantan, fizike perfektan. Sed, subite, mi diris : « Si estas ŝtelistino ! »...

La junulino estis fianĉinigitaj, ŝi estis baldaŭ edzinigonta. Si estis en Parizo, ŝia fianĉo loĝis en norda urbo. Estis grave... La patrino de la junulo, ĉeestanta, estis konsternita, kaj la aliaj ĉeestantoj, tre ĝenataj. Mi estis eliginta vorton, kaj mi faris nenion plu...

Oni faris enketon : mi estis vere pa-

## ABONOJ

La abonoj komenciĝas ĉiujare en la monato de Oktobro, tio estas : ĉiu persono kiu abonas post la monato de Oktobro ricevas la antaŭajn numerojn.

..

## MANUSKRIPTOJ

La manuskriptoj ne estas resendataj. Niaj korespondantoj prenas sur sin la tutan respondecon de siaj komunikaĵoj.

La reklamoj ne implikas la redakcion de la gazeto.



rolinta ! La malfeliĉulino estis kaptita, ĉe la freŝa faro (3), en granda pariza magazeno. La geedziĝo ne okazis.

Por mi mem, sekrete, mi laboris ; poste, mi akiris aplombon, la eksperimentoj reigis. Mi nun ne plu kalkulais ilin. Unuafaje, per la voĉo de *La Prospection à distance*, mi parolas pri tio publike. Tio estu por konfuzigi la materialistojn, kiuj mokridas, sed nenion klarigas.

\*\*

*Tiu okazintaĵo trovas ĝustan lokon en Radiesteza Gazeto ; efektive, ĝi pravas la ekziston de misteraj influoj, eligantaj ne nur de estuloj, sed ankaŭ de estaĵoj.*

*Por diversajceloj, oni provas kapti tiujn ondojn kiuj elmontras la ekziston de la radiestezo.*

(1) La psikometrio permesas indiki, per nura objekto, la okazaron kiu okazis antaŭ tiu atestilo.

(2) Signifas en latina lingvo : *hanc vivo de la vivo.*

(3) Francaj legantoj traduku tiun esprimon per : *en flagrant délit.*

## HAVIGU PLEJ FRUE SENPAĜAN PENDOLON

*Tiuj kiuj havigos al ni 6 novajn abonantojn al Radiesteza Gazeto kaj sendos al ni la liston de tiuj 6 personoj, kun la mono de la ses abonoj, ricevos senpage unu Pendolon Emile Christophe kies valoro estas 25 fr. fr.*

*Tiuj kiuj havigos ni 10 abonantojn, en la samaj kondiĉoj, ricevos senpage unu ekempleron de « Estu Radiesteza Serĉisto » de Emile Christophe (valoro : 30 fr. fr.).*

*Fine, tiuj kiuj havigos al ni 15 abonantojn ricevos 1 pendolon kaj 1 libron « Estu radiesteza serĉisto ».*

## NI RAPORTU

Ni estus kontentaj ricevi de kelkaj legantoj la rezultatojn de iliaj eksperimentoj kaj samtempe la rezultatojn de landaj famaj radiestezistoj, por konatigi ilin en la tuta mondo... radiestezista kaj esperantista.

Aliparte, estus bone por la propagando ke ĉiuj legantoj, kiuj ĝin povas, presigu en la naciajn, regionajn, lokajn aŭ esperantajn gazetojn kaj revuojn, ian artikolon pri la propagando de RADIESTEZO per ESPERANTO, kio elmontras ke la lingvo de Zamenhof VIVAS kaj ke oni UZAS ĝin PRAKTIKE.

Ni estus dankaj ke tiuj kiuj faros tion sendu al ni unu (preferinde du) ekzemplerojn de la gazeto kie aperis la artikolo (aŭ eltranĉaĵon) kun la esperanta traduko de ĝi.

## DUOBLAN CELON HAVAS « RADIESTEZA GAZETO »

1) Propagandi RADIESTEZON per ESPERANTO.

2) Propagandi ESPERANTON inter la ĉiulandaj RADIESTEZISTOJ.

Por plenumi tiun celon kun plej granda sukceso, ĝi bezonas la helpon

## DANK'AL RADIESTEZO

*Objekto, serĉata dum ses monatoj estas retrovita en kvin minutoj.*

*Sinjoro Max Fay, 27, rue Camille Desmoulins, Drancy (Seine). Francujo, skribis, la 7-an de Julio 1937, la jenan leteron al S-ro Emile Christophe.*

Kara Sinjoro Christophe,

Mi estas tre feliĉa koni vian metodon, ĝi estas la plej simpla kaj la plej oportuna. Tial, mi ofte relegas viajn verkojn. Dank' al tiu metodo, mi retrovis, antaŭ kelkaj tagoj, remilojn de cikloremanto kiuj estis perditaj de ses monatoj. Ili estis kaŝitaj por puni la infanon, kaj, malgraŭ ĉiaj serĉadoj, la gepatroj tute ne povis retrovi ilin.

La dometo konsistas el kvin ĉambroj, el granda keletaĝo traembarasata per maŝinoj, feraĵoj, ligno, kaj el grenejo 30 kvadratmetra, ankaŭ embarasata.

Mi turnigis la pendolon super la ciklo, ĉe la loko de la remiloj, kaj mi rigardis la direkton kiun indikis la pendolo. Ĉe la flanko de la keletaĝo, la pendolo restis senmova. Ĝi irigis min ĝis eta ĉambro kie estis ŝtupareto kondukanta ĝis la grenejo. Mi daŭre observis la balancigon de la pendolo, kaj, en la grenejo, la suddirekton kiun ĝi indikis al mi. Kaj mi retrovis la remilojn en tubforma akvujo, tie enremizigita ! en kvin minutoj, mi estis retrovinta objekton kiun oni estis serĉanta dum 6 monatoj ; kaj oni estis jam serĉinta en la grenejo, tri aŭ kvar fojojn !

...Ne povas temi ĉi-tie pri sugesto. Ja dank'al la pendolo tio povas esti okazinta.

Bonvolu akcepti, Kara Sinjoro Christophe, miajn plej bonajn sentojn.

MAX FAY.

## POR PICNIROJ DE RADIESTEZO KAJ ESPERANTO

*La grava semajna gazeto Marianne (44, avenue des Champs-Élysées, Paris (8<sup>e</sup>), publikigis en la numero 8-9 1937 vere interesan anekdoton pri Samuel F. B. Morse, inventinto de la elektro-magneta telegramo kaj de la alfabeto kiuj havas lian nomon. Kiam la ĝeniulo estis petinta de amerikaj oficialuloj subvencion, iu el ili juĝis tiel malbone la inventaĵon : « La sistemo de tiu Sinjoro Morse ŝajnas al mi bona apenaŭ por frapi frapojn en spiritistaj kunveno... »*

*Radiestezistoj kaj Esperantistoj, ambaŭ umikoj de la Progreso, vi trovas ĉi-tie ankoraŭ unu certigon ke ĉiujn progresemulojn oni ĉiam forpuŝis, eĉ en la oficialoj rondo.*

PIERRE DELAIRE.

de ĉiuj bonvolaj ESPERANTISTOJ kaj RADIESTEZISTOJ.

« RADIESTEZA GAZETO » ne nur radiestezistojn devas interesi, sed ankaŭ radiestezo-amikojn.

## PEREIGAJ ONDOJ

(Daŭrigo)

*En nia oktobra numero, ni publikigis du okazintaĵojn de s-ro Paul Croiset, kiuj elmontras la ekziston kaj la persiston de la pereigaj ondoj. Ni citi : hodiaŭ la du lastajn kiujn s-ro Croiset publikigis en « La Prospection à distance » (aŭgusto 1937).*

III. — La 1-an de oktobro 1936, mi lokiĝas ĉe la tablo de unu el miaj amikoj de Nancy, Ch. B..., en lia domo kien mi venis unuafaje. Tuj, forta pereiga radiado efikas al mia dekstra brako kaj, samtempe, al la maldekstra, poste al la maldekstra kruro ankaŭ. Mir ne delokante, mi indikas, per nenio en la mano, la lokon de la pereiga fluego. Kelkajn tagojn pli malfrue, mia amiko, kiu estis konsultinta la planojn de sia domo, konsultis ke la kloakotubo pasas malsupre de la loko kiu estis al mi donita. Mi rapide diras ke ne en ĉiuj domoj oni sentas pereigajn eligojn super la kloako ; tio dependas, mi tion supozas, de la elekto aŭ de la kvalito de la materialo uzata por la konsistigo de la tubo, de la zorgo per kiu oni ekzekutis la laboron, aŭ, ankaŭ, de la difektaĵoj okazintaj en la laborado.

IV. — Mi iras, la 20-an de Marto 1937, ĉe s-ro X..., unu el miaj radiestezistaj amikoj el Nancy, kiun mi trovas parolanta kun s-ro M..., alia radiestezisto. Mi sidigas kaj mi aŭskultas la konversacion. Apenaŭ instalita, mi sentas fortan doloron ĉe la dekstra manradiko ; tio estas pereiga eligaĵo kiu montras tiel al mi sian ĉeeston ; ĝi estas tre forta tie kie troviĝas la skribotablo de s-ro X.... Tiu-ĉi, surprizata, prezentas sian vergeton ; li akiras per ĝi tre malkaresajn movojn ; li serĉas la serion kaj trovas tiun de la akvo. « Tio estas, diras li al mi, akvokuvo kiu troviĝas en la kelo. Tio certe ne estas trinkebla akvo, mi respondis. — Ne, lavotaj tukoj trempas en tiu kuvo. » Notinde estas ke, nek s-ro X..., nek s-ro M... estis malsanmetigitaj pro tiuj eligaĵoj kiuj, pereigaj sub mi, estis senefikaj sub ili... Ni ankaŭ rimarku ke la pereigaj eligaĵoj ne ĉiam elvenas de la subgrundo.

La 26-an de aprilo 1937.

Paul CROISET,  
7, rue de la Ravinelle  
Nancy (Francujo).

## RADIESTEZO KAJ IDO

*S-ro Meier-Heucké (Luxembourg) paroladis pri Radiestezo, okaze de la 14-a internacia Ido-kongreso en Parizo (10-14 aŭg 1937). La lingvo kiun li uzis estas Ido.*

*Esperantistoj, atentu ! Se vi deziras ke Esperanto restu la internacia lingvo de la tutmonda radiestezistaro, subtenu Radiesteza Gazeto'n, sendante tiujn vian jarabonon. P. D.*

## DONAĈOJ

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE estas ĉiam bonvenanta. Vidu la anoncetojn.



7  
**RADIESTEZA EKSPERIMENTO  
EN NEDERLANDO**

Voorburg, '23-X-37.

Al S-ro Pierre DELAIRE,

Direktoro de la « Esperanto-Oficejo ».

Tre Estimata Sinjoro,

Koran dankon pro la provnumero de la *Radiesteza Gazeto*. Ĝi estas tre interesa kaj mi certe legigos ĝin.

La haga biblioteko de la inĝenieroj akceptis la ĉefverkon de la ĵus nin forlasinta Pastro Mermet : « Comment j'opère ». En nia norda provinco Friesland, en la vilaĝo : Ranwerd, S-ro Mieremet faris sukcesplajnajn esplorojn sub la aŭspicioj de kuracisto. La eksperimentoj klare montris la ĉeston de sandetruaj terradioj (pereigaj ondoj) en akordo kun la statistiko pri mortkazoj.

Altestime kaj samideane,

F-ino Marie E. GILTAY,  
Parkweg 99  
Voorburg, Nederlando.

**KORESPONDO**

« La ideo fari esperantlingvan gazeton por permesi al la radiesteza serĉistoj de ĉiuj landoj la interkomunikon de iliaj observaĵoj, estas tre interesa kaj povas esti tre profita por la Radiestezo... kondiĉe ke la radiestezistoj faru la etan, intelektan kaj monan provpenon kiu havigos al ili la eblon kompreni. Mi gratulas vin pro tiu ideo kaj precipe ĉar vi ĝin realigis... Mi trovas, per via gazeto, la rimedon kutimiĝi al Esperanto, min helpante per via *Esperanto en 12 lecionoj...* »

(Letero al Sinjoro Pierre Delaire, sendita la 21-an de oktobro 1937, de S-ro Paul Croiset, el Francujo — Nancy.)

La plej malkara, kvankam la plej riĉenhava el ĉiuj monataj esperanto-gazetoj estas

**NIA GAZETO**

absolute sendependa  
organo eldonata de la franca  
ĉiutaga ĵurnalo  
« Eclairer de Nice »

Direktoro : Georges AVRIL  
Petu senpagan provekzempleron !

NIA GAZETO  
29, Avenue de la Victoire, 29  
NICE (Francujo)

S-roj K. BERNSTROM, Klingsta Gard, Danderyd, *Svedujo* kaj Max DELAIRE (19 1/2 jara), 63, rue de Patay, Orléans (Loiret), *Francujo*, dez: koresp. kun s-anoj de ĉiuj landoj.

8  
**ESPERANTO-OFFICE**

(Esperanto-Oficejo)  
Francujo.

**« ESTU RADIESTEZA  
SERĈISTO »  
de Emile Christophe.**

Esperanten tradukis (el la franca lingvo), Pierre DELAIRE. — Libro 222-paĝa.

*Enhavo.* Kiamaniere oni uzas la vergeton kaj la pendolon. Nova metodo. Malsanoj kaj sanigoj. — Veterinara medicino.

Prezo afrankite : Francujo, 32 fr.fr.

Aliaj landoj : 34 fr.fr.

Ĉiujn mendojn sendu kun mono al S-ro Pierre DELAIRE, dir. de Esp. Oficejo, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret), Francujo.

**NI PERSISTU**

La vojo estas malfermata por ĉiuj serĉantoj. Ili ne estu malkuraĝigataj de kelkaj anomalioj, kelkfoje ege malhelpantaj, kiujn ili konstato dum siaj laboroj. Ili kontraŭe devos ilin zorge noti por tiri el tiuj, pli malfrue, konkludojn kiel eble plej interesajn. Ili do fervorege kaj metode esploru tiujn nekonatajn mirindaĵojn, por la plej granda Bono de Homaro. La sukceso kronrekompencos iliajn laborplenaĵojn provenojn, kaj la estonto pravigos iliajn belegajn-esperejojn.

(El *Estu Radiesteza Serĉisto* de Emile Christophe. 3-a ĉapitro, fina paraĝrafo.)

**ABONU TUJ**

**« RADIESTEZA GAZETO » N**

**DUSAUSOY**

**JUVELISTO**

**korespondas**

**en**

**ESPERANTO**

**en Ĉiuj landoj de  
la mondo**

**41, Boulevard des Capucines**

**PARIS**

9  
**DU VERKETOJ  
DE PIERRE DELAIRE**



*L'Esperanto en douze leçons* (Esp. en 12 lecionoj) — Oportuna franclingva lernolibro. Prezo : Francujo : 6 fr.fr. Eksterlando : 7 fr.fr.

*Tu seras Espérantiste !* (Estu Esperantisto !) — Franclingva varbbroŝuro dediĉita al S-ro Jean Zay, franca Ministro por Nacia Edukado. — Prezo : Francujo : 5 fr. fr. afrankite. Eksterlando : 6 fr. fr.

franca Ministro por Nacia Edukado. — Prezo : Francujo : 5 fr. fr. afrankite. Eksterlando : 6 fr. fr.

**ANONCETOJ**

Unu linio : 5 fr. fr.

Ili devas esti antaŭpagitaj.

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE, duoble uzehla, por la radiesteza kaj teleradiesteza serĉadoj. Oportuna kombino de malpeza pendolo (10 gr.) kaj de peza (70 gr.) en unu sola pendolo. Prezo afrankite, Francujo : 27 fr. fr., aliaj landoj : 30 fr. fr. Sendu mendojn kun mono al S-ro Pierre DELAIRE, dir. de *Radiesteza Gazeto*, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) Francujo.

« SOUS LE CIEL ». — Dans cet élégant magazine, vous trouverez des articles passionnants sur l'Astrologie, l'Astronomie, la Radiesthésie, La Géomancie et toutes les sciences Divinatoires.

Lisez-le et vous deviendrez un abonné de « Sous le Ciel ». Nous vous adresserons un spécimen contre un franc : écrivez au Collège Astrologique de France, 108, rue du Ranelagh, Paris (16<sup>e</sup>). Abonnement : 40 francs par an.

NENIU LINGVO, sen literaturo. Plej trafe prezentas al vi nian literaturon la revuo LITERATURA MONDO. Luksa aspekto, ilustrita. Abono por jaro 65 francajn frankojn, ĉe LITERATURA MONDO Budapeŝt, Soroksari ut 38-40 V. 6.

PLI OL MIL ilustritajn libropagojn egalas tutjara kolekto de nia sola literatura gazeto.

LITERATURA MONDO. Abono por jaro : 65 fr. Specimeno : 2 fr.

**LES ECRITS PACIFISTES**

*Communiqué :*

Le romancier Jean Souvenance et l'éditeur René Debresse ont décidé de lancer la collection des *Ecrits Pacifistes*.

Les *Ecrits Pacifistes* marqueront le renouveau de notre littérature en lui donnant une véritable valeur morale et sociale. Adresser les manuscrits (romans, poèmes, études, essais, théâtre, etc...), à René Debresse, 38, rue de l'Université, à Paris.




Direktoro :  
**Pierre DELAIRE**  
dir. de Esperanto-Oficejo  
63, rue de Patay 63, ORLÉANS (Loiret)  
FRANCUJO

**JARABONO**  
(12 numeroj)  
Francujo ..... 15 fr. fr.  
Aliaj landoj ..... 20 fr. fr.

**ANONCETOJ**  
Unu linio ..... 5 fr. fr.  
Ili devas esti antaŭpagitaj

Komunikadojn, abonojn,  
anoncetojn, kpl. sendu al la  
direktoro, ĉi-supra adreso.

# RADIESTEZA GAZETO



INTERNACIA ESPERANTLINGVA ORGANO DE LA RADIESTEZISTOJ KAJ RADIESTEZO-AMIKOJ — APERAS MONATE

## NECESA AGADO

### Ni laboru por Radiestezo per Esperanto kaj reciproke

En la unua (oktobra) numero de Radiesteza Gazeto, en la artikolo « PER ESPERANTO », mi insistis pri la grava fakto por la Esperantomovado, kiun konsistigas la tutmonda disvastigo de Radiestezo pere de nia internacia helplingvo Zamenhofa.

Mi ne bezonas diri kiom multaj gesamideanoj el ĉiuj landoj plene aprobas la ideon de internacia ĵurnalo, verkita en Esperanto, celanta la interkonatigon kaj la interkomunikon de la ĉiulandaj radiestezistoj, same kiel la propagandon de la mirinda scienco de la ondoj per NIA LINGVO.

Nur tre malmultaj esperantistaj gazetoj estas ĝis nun povintaj reĉenzi pri nia gazeto. Tial ni povis kolekti opiniojn (cetere tre variajn, eĉ kelkfoje kuriozajn) nur de privataj samideanoj. Sed, ĉu ne, sinjoro Tempo ne senkulpiĝas la trarapidemulojn... kaj baldaŭ venos la... tempo kiam gazetistoj, per la voĉo de sia organo, informos sian legantaron pri tiu nova okazaĵo en Esperantujo.

Tamen, ni povas resume deklari ke

la afero estas kontentiga, kvankam ni devas certigi al niaj legantoj ke la rezultatoj devus esti multe pli gravaj. Indiferenteco ne havas sian lokon en esperantistaj rondoj kaj ni estas devigataj diri ke tiuj pri kiuj ni atendis plej multe montris ke ni komplete eraris, kaj reciproke.

Aliparte, ni konfesu ke estas, inter kelkaj esperantistoj, tro da hezitemo aŭ tro da malfido. Tio rapide foriĝu... venu tuj anstataŭantaj decidemo kaj Fido.

Esperantistoj, plene kontentigu vian konsciencon, ne forgesante ke vi estas Zamenhof-idoj, ke vi estas progresemoj kaj ke vi reprezentas moralan distingaron... NI LABORU modeste kaj efike por reciproka disvastigo de Radiestezo kaj Esperanto.

Karaj legantoj, helpu nin! Abonuan gazeteton (se tion vi ne nun estas farintaj) kaj varbu novajn adeptojn. Forte, kurage kaj...

Pierre DELAIRE,  
Direktoro-Fondinto  
de « Radiesteza Gazeto ».

## MEDICINA TELEDIAGNOZO

Kiel postmorta respektesprimo al la bedaŭrata kreinto de la perpendola diagnozo : Abato Mermet.

La 21-an de oktobro 1937.

Kara Sinjoro Christophe,

Mi komunikas al vi priteleradestezan fakton, elektitan inter multaj aliaj, tial ke ĝi estas, laŭ mia opinio, karakteriza por la precizeco de la perpendola diagnozo farita per foto.

Miaj metodoj estas tiuj kiujn vi rekomendegas en viaj du fundamentaj verkoj : « Estu Radiesteza Serĉisto » kaj « Apologiado de la radiesteza serĉisto ».

Ĉi-kune troviĝas la skriba atesto kiun S-ro Barrat, 53, rue de Poitiers, en Montmorillon (Vienne), Francujo, bonvolis sendi al mi.

Michel MOINE,  
place des Promenades,  
Airvault (Deux-Sèvres).  
Francujo.

### Skriba Atesto

Mi ja estis aŭdinta pri la radiesteza serĉistoj, sed mi tute nenion sciis pri iliaj eksperimentaj procedoj kaj, tion mi sincere diras, mi eĉ estis ASOC tre skeptika koncerne la radiestezo (en 1907).

La 29-an de Marto 1936, mi troviĝas non ĉe s-ro Michel Moine, en Airvault, ĝi enhavas la daŭro de la interparolado itajn artikolojn sciigis al mi ke li estas praktikaj industriala radiestezo kaj la teleradesteza indota al ĉi kaj, je mia granda miro, li petis kr. : S-ro i mi foton de persono bone konata la Rochefort mi, por ke li faru, el malproksimo. Aldonu kaj kiel elmonro, diagnozon de reprezentata persono.

Pro nura scivolemo, mi donis al s-ro Moine foton de mia filo Andreo, Esperanta 8-jara.

Post kiam s-ro Michel Moine estis montrinta al mi kelkajn malfortajn korpo-organojn, li sciigis al mi ke la Gimnasia trovas signojn de puse, lokalizitajn en la apendicito, kio surprizigis mi multe, ĉar ĉe mia forveturo el Montmorillon, la infano ne estis malsaneta. Mi konsideris nenion grava en tiu diagnozo, kiun mi opiniis pliguste fantazia, kaj mi revenis hejmen, trovanta la infanon en perfekta sano. Sed, kvar tagojn poste, li estis

## ABONOJ

La abonoj komenciĝas ĉiujare en la monato de Oktobro, tio estas : ĉiu persono kiu abonas post la monato de Oktobro ricevas la antaŭajn numerojn.

\*\*

## MANUSKRIPTOJ

La manuskriptoj ne estas resendataj. Niaj korespondantoj prenas sur sin la tutan respondecon de siaj komunikadoj.

La reklamoj ne implikas la redakcion de la gazeto.

Le represo de la artikoloj estas permesata, sed kun indiko de deveno (titolo de la gazeto, numero, prezo kaj kompleta adreso).

## KORESPONDO

Ni respondas nur al la leteroj enhavantaj unu respondukuponon.

### DUOBLAN CELON HAVAS « RADIESTEZA GAZETO »

1) Propagandi RADIESTEZON per ESPERANTO.

2) Propagandi ESPERANTON inter la ĉiulandaj RADIESTEZISTOJ.  
Por plenumi tiun celon kun plej granda sukceso, ĝi bezonas la helpon de ĉiuj bonvolaj ESPERANTISTOJ kaj RADIESTEZISTOJ.

« RADIESTEZA GAZETO » ne nur radiestezistojn devas interesi, sed ankaŭ radiestezo-amikojn.



malsana; la kuracisto diagnozis *apendicitan atakon*, sed ne opiniis necesa hiruŝian peradon. Tiam mi memoris pri la diagnozo estigita de s-ro M. Moine kaj mi insistis por ke la infanon oni operaci. Post la operacio, la kuracisto deklaris al mi ke la radiesteziŝto estis ĝuste « vidinta », kaj ke mi plene pravis, ne atendantaj pli longatemp; la apendicito portanta tre netajn postsignojn de puso.

De la tempo de tiu eksperimento inter la plej pruvantaj, mi estas serioza ano kaj defendanto de la teleradiestezo. Kaj ja volonte mi liveras, laŭ la taŭgantaj formalajoj, al s-ro Michel Moine, la ĉi-supran ateston de mia dankemo kaj de lia lerteco de teleradiesteziŝto.

En Montmorillon, la 25-an de septembro 1937.

E. BARRAT,  
53, rue de Poitiers,  
Montmorillon (Vienne).  
Francujo.

Vidita de mi. Urbestro de Montmorillon, por la leĝigo de la subskribo de s-ro Barrat.

Montmorillon, la 29-an de septembro 1937.

La Vic-urbestro:

GOUJEUIL,  
anstataŭanta la urbestron aliloke  
okupatan.

## LA TELERADIESTEZO

Bordeaux, la 16-an de junio 1937.

Kara Sinjoro Christophe,

Jen ekstreme kurioza fakto kiu ĵus okazis al unu el miaj lernantinoj.

Tiu-ĉi procedis, sekrete de la interresatino kaj de ŝia kunvivantaro, diagnozon sur anatomia bildo, per, kiel atestilo, la haroj de sinjorino, grave malsana kaj forlasita de ĉiuj kuracistoj: La pendolo indikis al ŝi, kiel malsanan lokon, ejon en la cerbo.

Nu, tiun saman tagon, kaj en la sama momento (kontrolo farita poste), la malsanulino estis diranta al sia edzo ke ŝi « havis la impreson senti kvazaŭ bulon, moviĝantan en sia kapo, tiom regule kiom horloĝa balancstango ». Sed, tio estas ankaŭ pli kurioza, de tiu momento, ŝi sentis grandan bonfartadon, kaj dearis ke ŝi sentis sin revivanta.

Kion vi opinias pri tio?  
Ĉiaokaze, ŝajnas al mi ke interese tus scii ĉu aliaj kolegoj estas, dum daŭro de siaj serĉadoj, konstatintaj faktajn similtajn al tiu-ĉi.  
Miajn plej bonajn sentojn.

D. CHICCA,  
Inĝeniero,  
58, Cours Georges-Clémenceau,  
Bordeaux (Gironde)  
Francujo.

## DONACOJ

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE estas ĉiam bonvenanta. Vidu la anoncetojn.

LEGU SENPROKRASTE  
LA ESPERANTAN TRADUKON  
DE LA INSTRUA VERKO  
de Emile Christophe

## LA PERPENSA EKESPLOREMO

La legintoj de « Estu radiesteza serĉisto ! » bone scias ke la fundamento de la verko de Emile Christophe konsistas el la procedo de perpensa eksplorema, tio estas: s-ro Christophe laŭtege deklaras, tute penso kaj la deziro de la eksperimentkaj vergeto) estas nenio en si, ke la penso kaj la deziro de la eksperimentanto estas la nepra elirpunkto de ĉia serĉado kaj, fine, ke la pendolo kaj la vergeto estas nur iloj de registro.

Ni publikigas ĉi-sube leteron kiu pravas la efikecon de tiu procedo kaj klarigas la ondoscamentigon, perpensa deziro, de la nunaj ondoj, sur malnova atestilo.

Poisy, la 5-an de aŭgusto 1937.

Kara Sinjoro Christophe,

Jen eksperimenteto kiu pravas la plenan taŭgecon de via procedo de Perpensa Eksplorema.

Tu amiko alvenigas min, iun tagon, pro malsana bovino, por ke mi trovu kreskajn ŝin resanigontan. Mi prenas, kiel dokumenton, la harojn de la besto, mi konvencie nombras la gravecon de ŝia malsano kaj mi gluigas al ŝi kelkajn infuzojojn.

La morgaŭan tagon, mi iras revidi ŝin, por konstati ŝian sanostaton. Mi havigas al mi denove kelkajn el ŝiaj haroj kaj konstatas ĝeneralan plibonigon de 20 %.

Poste, prenanta la dokumenton de la hieraŭa tago, mi uzas ĝin por serĉi ĉu oni povas, per ĝi, konstati la favoran evolucion de la malsano: mi trovas ke ĝi konservis la karakterizojn de la antaŭa tago.

Mi tiam pravas samcentrigi la nunajn ondojn sur tiu malnova dokumento. Mi tuj vidas mian pendolon donantan al mi indikojn identajn je tiuj akiritaj per la tute freŝe altiritaj haroj.

Tio pravas ke oni perfekte povas eksperimenti per malnova atestilo, sed kondiĉe ke oni samcentrigu sur ĝi, ĉiufoje, la nunajn ondojn.

Mi petas vin, ktp...

Henri PETELAT,  
Poisy (Haute-Savoie),  
Francujo.

## NI RAPORTU

Ni estus kontentaj ricevi de kelkaj legantoj la rezultatojn de iliaj eksperimentoj kaj samtempe la rezultatojn de landaj famaj radiesteziŝtoj, por konatigi ilin en la tuta mondo... radiesteziŝta kaj esperantista.

Aliparte, estus bone por la propagando ke ĉiuj legantoj, kiuj ĝin povas, presigu en la naciajn, regionajn, lokajn aŭ esperantajn gazetojn kaj revuojn, ian artikolon pri la propagando de RADIESTEZO per ESPERANTO, kio elmontras ke la lingvo de Zamenhof VIVAS kaj ke oni UZAS ĝin PRAKTIKE.

Ni estus dankaj ke tiuj kiuj faros tion sendu al ni unu (preferinde du) ekzemplerojn de la gazeto kie aperis la artikolo (aŭ eltranĉaĵon) kun la esperanta traduko de ĝi.

## RADIESTEZO KAJ TUBERKULOZO

Ni reproduktas ĉi-tie parton de interesa artikolo de D-ro Alexandre Valmyre, aperinta en la oktobra numero de « La Côte d'Azur Médicale » (D-ro J. Regnault, direktoro, 14, rue Pereisc, Toulon-Var-Francujo).

Sinjoro G. estas 16-jara. Li estas hereda tuberkulozomalsanulo kun malfruo. Lia patro mortis antaŭ kvar jaroj, pro fitzo. Li prezentas sin, en mia oficejo, en la monato junio, kun perdo de seskilogramo pezo, ĝenerala laceco, febro kaj signoj de « fermita » tuberkulozo de la tuta dekstra pulmo... Dufoje po ĉiu semajno, li devas veni por ke mi fiks al li, per la radiestezo, la nombron da necesaj podagroj, la nombron da supkuleraj por lia siropo.

Post ok tagoj, Sinjoro de G., posedantino de la farmodomo kie laboras lia patrino, venas al mi, petanta de mi skriban ateston por ke oni lin akceptu en higiejoj.

« Mi bonvolas » — tia estis mia respondo — « sed, en higiejoj, via protektato mortos; oni kuracos lin per la kutima procedo de la orsaloj kio estas al li radiesteze kontraŭindikata. Lasu lin al mi 15 tagojn kaj, se, per mia kuracado, mi ne akiros plibonigaĵojn, mi forlasos lin al vi ».

Dekkvin tagojn poste, la pli bona parto estis evidenta; en julio la pusigo de la bacilo estis iĝinta nula. Mi veturigas lin en la montaron, al la higiejo de Bounedonne kie la kuracistoj trovas en li nenian vundan difekton, nenian maldiafanaĵon, kaj faras al li nenian kuracadon, nur ripozigas lin. Tri monatojn post la komenco de la kuracado, estigita por li speciale, tiu juna tuberkulozomalsanulo estis akirinta dek kilogramojn kaj sentis sin preta por denove daŭrigi la penan laboron en la farmodormoj.

Ĉu tio estas sufiĉe klara?

Hyères, la 8-an de septembro 1937.

Doktoro Alexandre VALMYRE.

## LA RADIESTEZO KAJ LA INFANOJ

Kun granda intereso, mi legis vian libron: Estu radiesteza serĉisto, kaj mi konatigas al vi tri eksperimentojn de Perpensa Eksplorema, perfekte sukcesintajn de 10-jara infano (mia nevo) en la jenaj kondiĉoj:

Rimarkinte ke mia nevo estas tre sentema, je la radiesteza vidpunkto, kaj ke la pendolo tre bone funkcias en liaj manoj, mi vidigis al li arĝentan moneron de dek fr fr.; poste mi ĝin kaŝis en la ĉambro kie ni estis, kaj mi petis de li ke li serĉu ĝin per la pendolo, dezirante ke la direkto de la monero estu indikata per la pendolo. Li tiaprocede akiris unuan direkton, kaj mi petis ke li tranĉu ĝin de alia loko, klarigante al li ke, ĉe la renkontopunkto de la du linioj, li trovos la moneron, kaj li tion tuj sukcesis. Daŭro de la eksperimento: 3 minutojn ĉirkaŭe.

Por kontroli tiun rezultaton, mi



montris al li flavan lenson de fotografilo kaj reigis mian eksperimenton. La sama rezultato estis akirata kaj mi lasis lin sole eksperimentanta.

Tria eksperimento : mi montris al li krajonon kun verda papero, mi kasis ĝin sur mia brusto, sub mia ĉemizo. Sama pruvrezultato.

Ch. PASTEUR,  
3, rue Klein,  
Besançon (Doubs)  
Francujo

(El letero sendita al s-ro E. Christophe, publikigita en la oktobra numero de « La Prospection à distance »).

## TRA LA GAZETARO

### En Esperantujo

El Franca Esperantisto (34, rue de Chabrol, Paris X, Francujo), novembro numero :

« Nia juna antiko Pierre Delaire ne nur plej trafe propagandas, sed sukcesis enkonduki esperanton en tiun specialan fakon de radiestezo. Ni gratulu kaj deziru bonan laboron al la nova faka gazeto. »

Nia Gazeto (Dir. s-ro G. Avril, 29, av. de la Victoire, Nice, Francujo) represigis, en sia novembro numero, la artikolon « Fiŝkaptistoj atentu ! » aperintan en la oktobra numero de Radiesteza Gazeto.

Radio-Esperanto (Dir. s-ro H. Favrel, 26, av. Dode-de-la-Brunerie, Paris XVI, Francujo) afable anoncas, en sia numero de la tria jarkvarono 1937, la aperon, de oktobro, de Radiesteza Gazeto.

### En Francujo kaj kolonioj

La Presse Marocaine kaj Le Petit Havre, ambaŭ ĉiutagaj gazetoj kaj L'Intermédiaire Forain, ĉiusemajna, plej bone recenzis pri Radiesteza Gazeto.

### Ni ricevis...

La du jenajn novajn gazetojn :

Per unuigitaj Fortoj, ĝenerala revuo de la Esperanto-movado. Dir. : s-ro R. Movo, rue Jullien, 84, Paris-Vauves (Francujo). Monata.

Bolanta Kaldrono (monata bulteno de Esperantista Montmartra Kabaredo). Senpaga servo. Red. : s-ro A. Remond, 110, Bld de Clichy, Paris XVIII, Francujo.

### Lastamomente

La Bulteno de Aŭstria Esperantista Federacio (Wien 15, Holohergasse 55/9) anoncas la aperon, depost oktobro 1937, de Radiesteza Gazeto, en sia numero Novembro-Decembero 1937.

Le Bonhomme du Nord et du Pas-de-Calais (8, Rue Delcambre, Douai, Francujo) tre afable recenzas, en sia numero 4-7 Decembro 1937, pri la disvatiĝo de Esperanto en la fako de radiestezo. Pri tio, ĝi verkis en la « Esperantista Kroniko » (monata). Dankojn al Sinjoro Humez, Redaktoro de tiu longa kaj interesa regula kroniko.

## RADIESTEZA GAZETO

aperas regule, ĉiumonate, la 15-an.

## LA RADIESTEZO EN LA LERNEJOJ

La 15-an de novembro 1937.

Kara Sinjoro Christophe,

Kliniĝanta hejme super la tasko de lernanto, mi povas trovi, per la pendolo kaj per la Perpensa Eksplorejo, sciigojn kiuj klarigas al mi multajn enigmojn... kaj mi ĉerpas el tiuj sciigoj ĉion necesan por konduki lernanton laŭ liaj kapabloj, liaj spiritaĵoj kaj korpaj fortoj.

Kiam ni ekskursas, ni studas la kreskadojn laŭ la grado de la kuraca aŭ pereiga efikokapablo, uzante la pendolon aŭ la vergeton. La subgrundo estas esplorata, kaj iuj estas, inter tiuj etaj homoj, kiuj estas jam kapablaj serĉadi fontojn kaj indiki ilian profundecon... Mi ankaŭ permesas al ili rakonti siajn eksperimentojn en siaj klasaj verkoj. Ci-sube estas eltiraĵo, kiel ekzemplo, kiun mi tradukis el la originalo germanlingve verkita.

Sinceran saluton.

Henri MEIER,  
instruisto en Esch-sur-Alzette  
(Luksemburgo).

### Kiamaniere mi trovis fonton

« Vendredon ni promenadis. Ni « estas serĉintaj fontojn pere de la « pendolo kaj de la vergeto. En So- « leuvre, ni estas serĉintaj fonton en « ĉirkaŭbarita paŝtejo. Kiam ni alve- « nis sur la herbejo, ni trairis la « grundon kun la pendolo en la ma- « no. Subite, mia pendolo ekbalanci- « ĝis. Mi diris al S-ro Mastro ke mi « estas trovinta fonton. Li alvenis kaj « tio estis akurata. Mi povis jam me- « zuri la profundecon de la fonto. Ni « sekvis ĝin ĝis loko kie ĝi estis nur « 30 centimetrojn profunda. La bie- « nulo, s-ro Lucius, nin petis serĉi « ŝovelfosilon en najbaran domon, « Apenaŭ ni estis donintaj tri ŝovel- « fosilajn frapojn, kaj jam ŝpruĉis la « akvo. Ni ĉiuj reiris kontentaj hej- « men. Tiamaniere mi serĉis fonton « unufoje en mia vivo. »

Arthur ROMMES, 10-jara.  
(La unua de la 5-a studjaro en 1937.)

(La originalo estas germanlingva, s-ro Meier franclingvigis ĝin por la gazeto « La Prospection à distance » de s-ro Christophe, kaj, fine, la redakcio de « Rad. Gaz. » esperantigis ĝin el la fr. ling.)

## GVIDANTOJ DE DAURIGAJ KURSOJ

La Gvidantoj de daŭrigaj kursoj kiuj deziras ricevi TUTE SENPAGE la duan eldonon de la Plena Gramatiko de Esperanto, verkita de S-roj KALOCSAY kaj WARINGHIEN — 500 — paĝa grandformata libro, kun densa komposto kaj vendoprezco de usonaj dolaroj 2.86 — skribu tuj pri tio al la eldonejo

### Literatura Mondo

Budapest IX, Soroksári ut 38, Hungarujo, aŭ al sia kutima libroliveranto.

## ESPERANTO-OFFICE

(Esperanto-Oficejo)  
Francujo.

## EMILE CHRISTOPHE

« Estu Radiesteza Serĉisto »

Esperanten tradukis (el la franca lingvo), Pierre DELAIRE. — Libro 222-paĝa.

Enhavo. Kiamaniere oni uzas la vergeton kaj la pendolon. Nova metodo. Malsanoj kaj sanigoj. — Veterinara medicino.

Prezo afrankite : Francujo, 32 fr. fr.  
Aliaj landoj : 34 fr. fr.

## DU VERKETOJ DE PIERRE DELAIRE



L'Esperanto en douze leçons (Esp. en 12 lecionoj) — Oportuna franclingva lernolibro. Prezo: Francujo : 6 fr. fr. Eksterlando : 7 fr. fr.

Tu seras Esperantiste ! (Estu Esperantisto !) — Franclingva varbrosuro dediĉita al S-ro Jean Zay,

franca Ministro por Nacia Edukado. — Prezo : Francujo : 5 fr. fr. afrankite. Eksterlando : 6 fr. fr.

Ĉiujn mendojn sendu kun mono al S-ro, Pierre DELAIRE, dir. de Esp. Oficejo, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret), Francujo.

## ANONCETOJ

Unu linio : 5 fr. fr.

Ili devas esti antaŭpagitaj.

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE, duoble uzebla, por la radiestezaĵoj kaj teleradiestezaĵoj serĉadoj. Oportuna kombino de malpeza pendolo (10 fr.) kaj de peza (70 gr.) en unu sola pendolo. Prezo afrankite, Francujo : 27 fr. fr., aliaj landoj : 30 fr. fr. Sendu mendojn kun mono al S-ro Pierre DELAIRE, dir. de Radiesteza Gazeto, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) Francujo.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (fondita en 1907) eldonas luksan revuon, kiu estas nomita simple : « La Bulteno », ĝi enhavas interesajn kaj ilustritajn artikolojn pri ĉiuj sciencoj kaj industrioj. Provekzemplero estas sendota al ĉiu kiu ĝin petos al la ĝen. sekr. : S-ro M. D. DUPUIS, 56, rue de La Rochefoucauld, Paris (9<sup>e</sup>) Francujo. Aldonu 1 intern. resp. kup.

ILUSTRITANFALDPROSPEKTON pri ĉeĥoslovakujo senpage sendas al niaj legantoj : ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Praha XIX Uralské 9.

X — a SOKOL-OLIMPIADO PRAHA 1938, ilustrita faldprospekto pri la festoj de la ĉeĥoslovaka Gimnasta Asocio SOKOL, okazontaj en julio 1938, 8 pg. 15 x 10 cm. Senpage ricevebla ĉe : ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Praha XIX, Uralské 9.

S — roj Knut BERNSTROM, Villavagen 23, Upsala, Svedujo kaj Max DELAIRE (19 1/2 jara) 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) Francujo, dez. kor. kun gesanoj de ĉiuj landoj.




Direktoro :  
**Pierre DELAIRE**  
dir. de *Esperanto-Oficejo*  
63, rue de Patay 63, ORLÉANS (Loiret)  
FRANCUJO

**JARABONO**  
(12 numeroj)  
Francujo ..... 15 fr. fr.  
Aliaj landoj..... 20 fr. fr.  
**ANONCETOJ**  
Unu linio..... 5 fr. fr.  
Ili devas esti antaŭpagitaj

*Komunikadojn, abonojn,  
anoncetojn, kpt. sendu al la  
direktoro, ĉi-supra adreso.*

# RADIESTEZA GAZETO



INTERNACIA ESPERANTLINGVA ORGANO DE LA RADIESTEZISTOJ KAJ RADIESTEZO-AMIKOJ — APERAS MONATE

## PETRO DANOV SKRIBAS PRI LA INFLUO DE LA KOLOROJ

**Laŭ la psika vidpunkto en sia verko  
« En la Regno de la Viva Naturo »**

*Ni ricevis de Biblioteko « Nova Kulturo » (Sevlievo, Bulgarujo) la duan eldonon de la spiritalista verko de Petro Danov : « En la regno de la viva Naturo. » Pri tiu libro ni recenzos en nia februara numero.*

*El tiu interesa verko ni tiras la sekvantajn liniojn pritraktantaj la influon de la koloroj sur la homon.*

*Malantaŭ la ordinara lumo staras aliaj energioj, pli altspecaj...*

*Ĉiu koloro havas organisman kaj psikan efikon.*

*La pure ruĝa koloro kaŭzas vivigon, sed, se oni ĝin akceptas ne puran, ĝi kaŭzas ekscitemon.*

*La pure oranĝa koloro kaŭzas la noblan individuecon kaj la nepura — la egoismon.*

*La pure flava koloro kaŭzas internan ekvilibron de la sentoj : ekvilibrigon, pacon, silenton, trankvilon. Kaj se oni ĝin akceptas nepuran, ĝi kaŭzas diversajn malsanojn.*

*La pure verda koloro kaŭzas kreskadon ĉiufланkan : mensan, koran, elmontron de noblaj sentoj, ktp. Kaj ne pura ĝi kaŭzas sekecon : fizikan kaj psikan.*

*La pure blua koloro abunde akceptita kaŭzas stimulon, plivastigon de la sentoj, elmontron de plej noblaj sentoj en la homo. Kaj en malabunda kvanto kaj nenatura speco, ĝi kaŭzas la malon : dubon, malfidon, senkredigon.*

*La pure malhelblua koloro kaŭzas firmecon, kuraĝon, fortikecon en la konvinkoj, en la sentoj. Kaj akceptita ne pura — malpersiston, malkonstantecon.*

*La pure viola koloro kaŭzas fortikan karakteron. Kaj akceptita nepura — malkuraĝon.*

*Oni povas pristudi la edukatan signifon de la koloroj, plantante en la ĝardenoj diverskolorajn florojn. Oni povas vidi, kian edukatan influon kaŭzas la ruĝaj, la bluaj, la malhelbluaj koloroj, ktp. Se oni sciis la efikon de la koloroj, oni ĝis certa grado povus sin eduki per ili.*

*Ĉiu penso produktas specifan koloron.*

La forto de la verkisto estas en la koloro, kiun li produktas en la interna mondo de la leganto. Tiuj verkistojn ni nomas bonaj, kiuj produktas en la homo pli purajn kolorojn.

Eĉ tiuj, kiuj komprenas nenion uzas la kolorojn. Tio ne estas arbitra. Tiuj, kiuj atentigas la kolorojn de la vestaĵo same obeas la suprajn leĝojn, nur ili agas grandparte subkonscie. Iuj kuracistoj eĉ kuracas per la koloroj.

Petro DANOV.

(En la regno de la Viva Naturo,  
paĝ. 60 k. 61)

*Komprenable, ni antaŭvidas kiom multe s-ro Petro Danov estas uno de radiestezo. Kaj ĉu ne, ĉu temas ke ni estu — aŭ ne — ano de radiestezo kaj ĉu ne estas vere ke ni bezonas nur konstati faktojn kaj dedukti konkludojn ?*

*Mi profitas tiun okazon por iomete skribi pri la influo de la koloroj sur la homon, laŭ la radiesteza vidpunkto. Multaj personoj certe jam kelkfoje rimarkis ke iuj, ege sentemaj, tute ne povas vidi aŭ surhavi iujn kolorojn, ĉar tiuj lastaj minacas ilin fariĝi malsanaj pro tio.*

*Feliĉe, la radiestezo permesas al ni studi la radiadojn de la koloroj kaj ankaŭ serĉadi ilian efikon. Nenio estas pli simpla : kaptu la radiadojn de la eksperimentata persono, tiu-maniere por ke vi akiru rondmovon turnantan en la direkto de horloĝo-montriloj, t. e., pozitivan rondmovon. Montru poste kelkajn specimenojn de koloroj etenditajn sur tablo, rektliniigitajn kaj forte deziru kapti iliajn radiadojn : vi konstatos ke la pendolo moviĝos pozitive super bonifikaj koloroj, ke ĝi turnos negative super malboninfluaĵ koloroj kaj, fine, ke via radiesteza ilo nur balanciĝos super neŭtraĵ koloroj.*

*En sia majstra verko « Estu radiesteza serĉisto ! », Emile Christophe raportas tiun sekvantan fakton : « Franklin, etendanta dum kelka tempo sur la neĝo, unu apud la alia, dum suna tago de degelado, du egalajn pecojn de sama teksaĵo, sed kies unu estis blanka kaj la alia nigra, pruvis ke la neĝo forfluidiĝis sub tiu lasta dum ĝi restis sendifekta sub la blanka teksaĵo. Oni ankaŭ povas re-*

## “RADIESTEZA GAZETO”

deziras

al siaj karaj legantoj

feliĉan novjaron

por 1938

*memorigi la elmontron de Rumford, amerika fizikisto : kiam blanka kaj nigra bolkruĉoj estas lokitaj je la sama distanco de fajro, la akvo entenita en la nigra ujo ekbolas multe pli frue ol la alia. »*

*Ankaŭ interese estas noti ke iu klerulo preskaŭ finfabrikis ilon per kiu ni povus koni la homan atmosferon. Li eĉ konsatis tion kuriozan : la ruĝa koloro estas signo de ĵaluzo kaj de kolereco ĉe tiu al kiu tiu lasta koloro konvenas, ke la flava koloro indikas karakterecon de konstanteco kaj de trankvileco, ke la verda koloro montras timemon kaj revemon...*

*Ha ! Esperantistoj, ĉu vi estas verdaj timemuloj kaj revemuloj ? Tiu pikajo estas ja stulta kaj nevera (ĉar la verda koloro ne estas la radiesteza koloro de ĉiuj esperantistoj), sed... montru tion bravante ĉiujn mokridemulojn kaj kontraŭulojn, helpante kiel eble plej multe la disvastigon de la radiestezo pere de Esperanto, kaj reciproke...*

*Ni revenu al nia temo. Alia raportinda fakto, pri la influo de la koloroj sur la homon, estas ke oni ne povas efektiviĝi la eksperimentojn sub la artefarita lumo.*

*Kaj nun : prenu en viaj manoj la Pendolon Christophe kaj faru la kontrolon ! Mi deziras al vi bonan sukceson kaj petas vin esplori en la plej bonaj kondiĉoj, t. e., uzu la Perpensan Ekesplorem, eksperimentu laŭgrade, ne estu malkuraĝigataj pro ŝajnaj malsukcesoj kaj fine, persistu. Bonan laboron !*

Pierre DELAIRE.

**RADIESTEZA GAZETO**

aperas regule, ĉiumonate, la 15-an.



## RADIESTEZO KAJ AVIADO

I. — Indiko de la alteco.

II. — Kapto de T. S. F. -aj leteroj.

Ni reproduktas ĉi-tie mallongan eltiraĵon de konferenco kiun donis s-ro Alfred Valette: « La Radiestezo pristudata de inĝeniero », okazinta en Parizo, la 3-an de oktobro 1938.

Dum la daŭro de unu el miaj traveturoj de Méditerranée, en avidilo, en la lasta maja monato, en plena maro, plurfoje, mi indikis la altecon de la akvo-aviadilo. Miaj sciigoj, kontrolitaj iom post iom de s-ro Cariou, direktlisto de Air-France, estis akurataj krom diferenco de 5 metroj malplie po 450 metr. de alteco, de 10 metr. po 900 metr.; ktp... Tiu progresio mem, en la eraro, ne estas neatentinda de kiu deziras serioze studi la reakciojn de la individuoj.

Ciam sur akvo-aviadilo, en plena maro, kun s-ro Pierre Viré, radio en Air-France, nevo de klerega Profesoro Armand Viré, mi kaptis la leterojn de la eligiloj de T.S.F., en komuniko kun la aviado, kaj mi indikis la daŭron de la letero, je ebla eraro de 1/4 de sekundo proksimume, precizante la eligilon eligintan la leteron.

Mi konfesas ke tiuj eksperimentoj ne okazas en la kutima praktiko; sed, mi tion rediras, ili tute ne rilatas kun la vizio. Temas, efektive, kapti kaj interpreti la fortojn, konatajn, absolute nevideblajn, senodorajn, kaj senkolorajn.

Lau mia opinio, tiuj eksperimentoj prefere havas la meriton montri la eblojn de la Radiestezo kaj malfermi vastegajn horizontojn al nia venonta vivo. Ili postulas de ni la studon de la homo, en ĝi mem, kaj en ĝiaj rilatoj kun la naturo en kiu ĝi devas vivi.

### ABONOJ

La abonoj komenciĝas ĉiujare en la monato de Oktobro, tio estas: ĉiu persono kiu abonas post la monato de Oktobro ricevas la antaŭajn numerojn.

\*\*

### MANUSKRIPTOJ

La manuskriptoj ne estas resendataj. Niaj korespondantoj prenas sur sin la tutan respondecon de siaj komunikadoj.

La reklamoj ne implikas la redakcion de la gazeto.

Le represo de la artikoloj estas permesata, sed kun indiko de deveno (titolo de la gazeto, numero, prezo kaj kompleta adreso).

### KORESPONDO

Ni respondas nur al la leteroj enhavantaj unu respondukuponon.

## LEGU SENPROKRASTE LA ESPERANTAN TRADUKON DE LA INSTRUA VERKO de Emile Christophe

## DENOVE PRI LA PERPENSA EKESPLOREMO

Laprade, la 20-an de decembro 1937.

Al S-ro Pierre DELAIRE.

Estimata Samideano kaj Kara Direktoro,

Mi bone ricevis la pendolon Emile Christophe, anoncitan en via letero, la 4-an de la nuna monato.

Aliparte, mi sendas al vi, ĉi-tie, artikoleton, inspiratan de la antaŭa numero de « Radiesteza Gazeto ». Se vi presigus ĝin, mi estus kontenta.

Mi antaŭdankas vin. Kaj bonvolu akcepti la plej bonan esprimon de miaj respektaj samideanaj sentoj.

Gilbert ALBY,

en Laprade, apud Les Martyrs (Aude) Francujo.

Jen la komunikaĵo de s-ro Gilbert Alby:

Unu el miaj amikoj, Pastro BOURDOUX, eksmisiisto en Mattogrosso, verkis la libron: « Notions pratiques de radiesthésie » en franca lingvo.

Tiun libron, kun letero de bedaŭrata Abato Mermet, kaj antaŭparolo de Doktoro J. Delclaux, membro de A.I.M.R., oni povas mendi (12 fr. fr.) ĉe la verkisto: Père Bourdoux, 10, place Ste-Claire, Albi (Tarn), Francujo. Reale, ĝi estas multinteresa.

Jen tio, kion oni legas, sur la paĝo 91-a (mi laŭvorte tradukas):

« Iu patro vidigis al mi fotografadojn de kvarjara knabineto, moro — tinta antaŭ unu deko da jaroj, aĝa de dek-ok jaroj. Do, la fotografado estis malnova de dudek-kvar jaroj.

« — De kia malsano mortis la filino? — demandis la patro? »

« Post esplorado, kiu ne daŭris unu minuto, ĉar, tuj de post mia unua demando, la pendolo balancigis kaj turniĝis, mi povis responde kulozo.

« — Konsentite, tio mem estas, diras la sinjoro. »

Ĉu tio ne estas mirinda? Kaj ĉu oni nepre bezonas samcentrigi ĉiujfoje nunajn ondojn sur malnova atestilo, same kiel tion skribis sinjoro Henriko Pételat en la antaŭa numero de « Radiesteza Gazeto »? Laprade, la 20-an de decembro 1937.

Gilbert ALBY.

Jen resume la tuto: multaj radiestezaĵaj serĉistoj uzas la Perpensan Eksploremon, tion ne sciante.

En tiu okazo, tute ne temis samcentrigi nunajn ondojn sur malnova atestilo, tial ke la studata persono estis mortinta. Esplorante, la serĉisto serĉis la kaŭzon de la morto de la fraŭlino kiu mortis dek-ok jara. La foto de tiu lasta reprezentu la fraŭlinon kiam ŝi estis kvarjara knabineto aŭ ĝi reprezentu ŝin ĉe la momento de la morto, la kaŭzoj de la morto estas la samaj.

Dankojn al s-ro Alby pro tiu rimarketo.

### DONACOJ

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE estas ĉiam bonvenanta. Vidu la anoncetojn.

## TRA LA GAZETARO

### En Esperantujo

L'Esperanto (Milano, Galleria Vittorio Emanuele 92, Italujo), en la rubriko « Tralegante la Gazetaron » prezentas sincerajn bondezirojn al « Radiesteza Gazeto », « nova branĉeto de la arbo de la esperanto-gazetaro ».

Afable anoncis la aperon de Radiesteza Gazeto la jenaj gaz. de Esperantujo: Frateco (Dir.: AT. NIKOLOV, Sevlievo, Bulgarujo), Scienca Gazeto (Amerika Esperanto-Instituto, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois, U. S. A.), Litova Stelo (Kauņas, Zemaĉiu g-vé 15, Litovujo) kaj Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio (Tallinn, postkast 6).

### En Francujo

La Petite Gironde (8, rue de Cheverus, Bordeaux), en sia numero 16-12-37, presigis sufiĉe longan artikolon pri la disvastiĝo de la radiestezo. IER ESPERANTO tra la tuta mondo, en la rubriko « Radiestezo kaj Sciencoj ». Dankojn al s-ro Périn, redaktoro de tiu regula rubriko, aperanta en tiu grava regiona ĉiutaga gazeto.

Plej afable recenzis pri « Radiesteza Gazeto » la ĉi-subaj jurnalaj: Butinons (8, rue de Queuleu, Metz), en sia novembro numero.

Bulletin d'Information du Centre d'Amitié Internationale (23, rue Cujas, Paris V<sup>e</sup>), en sia novembro numero.

Radiotellurie (115, Cours Lafayette, Toulon -Var-), en sia novembro-decembro numero.

### En Bulgarujo

Iun gazeton ni ricevis de la redakcio de Frateco. Tial ke ĝi estas presita en bulgaraj alfabeto kaj lingvo, ni ne povas indiki la titolon de la gazeto kaj ankaŭ ni ne komprenas la longan artikolon koncernantan « Radiesteza Gazeto'n ».

Certe ni povos doni tiujn sciigojn en la februara numero.

Kompreneble, ni laŭdas tiun okazintaĵon kiun ni dezirus vidi pliiĝata, t. e.: ni varme rekomendas al la enlandaj propagandistoj aperigi tiajn artikolojn montrantajn al la neesperantista publiko ke utilas Esperanto en ĉiuj fakoj.

### GVIDANTOJ DE DAURIGAJ KURSOJ

La Gvidantoj de daŭrigaj kursoj kiuj deziras ricevi TUTE SENPAGE la duan eldonon de la Plena Gramatiko de Esperanto, verkita de S-roj KALOCSAY kaj WARINGHIEN — 500 — paĝa grandformata libro, kun densa komposto kaj vendoprezo de usonaj dolaroj 2.86 — skribu tuj pri tio al la eldonejo

### Literatura Mondo

Budapest IX, Soroksári ut 38, Hungarujo, aŭ al sia kutima libroliveranto.



## RECENZO

D-ro Francisko Szilagyí  
« Ellernu »

D-ro Francisko Szilagyí faris grandan servon al Esperanto, verkante la progresan kurson de Esperanto « Ellernu ». Nia konata aŭtoro prezentas al la esperantista publiko vere interesan libron kaj precipe novan.

Ĉiu leciono de « Ellernu » enhavas la jenajn kvin partojn : 1-e) la grammatikan parton. Tie estas studata speciala punkto de la esperanta sintakso, *detale* kaj ĉiam kun taŭgaj ekzemploj. Ankaŭ troviĝas en tiu 1-a parto kelkaj taskoj kies kontrolon ni trovas ĉe la fino de la leciono. 2-e) la konversacian parton, akompanatan de multaj skizoj kaj desegnoj. Tiu parto konsistas el demandoj kaj respondoj. Tre amuzaj estas ofte la bildoj. 3-e) la literaturan parton en kiu ni vidas eliraĵojn el esperantaj tradukoj de klasikaj aŭtoroj kaj ankaŭ el modernaj originalaj verkoj. Klarigoj sekvas la eliraĵojn. 4-e) la grupludon kiu certe devas interesi ĉiujn gvidantojn de agemaj grupoj kaj ĉiujn esp. instruistojn. La kvina parto estas la kontrolo.

La lingvo estas tre korekta kaj fluas. La elektita literaturo estas tre facile legebla kaj incitas la lernantojn legadi la riĉan esperantan literaturon kiu ĉiutage kreskas. Tiu literatura parto konsidereble pliiĝas la valoron de tiu lerte aranĝita lernolibro.

Ĉiu serioza kaj grava grupo devas posedi almenaŭ 1 ekzempleron de « Ellernu ». La esperantistoj ne nur propagandu, sed ili emu scii *perfekte* la lingvon kiun ili disvastigas.

Pierre DELAIRE.

Prof. Théophile Cart  
« Trafendita Turo »

La teksto de tiu broŝureto estas presita en franclingva kaj esperantlingva verkoj, apudmetitaj. Ĝi konsistas el 15 versaj strofoj de 4 versoj po unu strofo. « Trafendita Turo » estas la legendo laŭ kiu Karlo-Grand' suspektas Genon pri la morto de Rolando en Roncesvalo. Geno estas vere la perfidulo. Festenon Geno donas kaj ĝin ĉeestas Karlo-Grand'. Post kiam, vane, la Imperiestro demandas Genon, « terurplena bruego aŭdigas. La ĉefur' de l' kastelo, de tegmento ĝis kelo, nevidebla per glavo, fendigas ». De tiam, tiu turo nomiĝas « trafendita ».

Jen interesa versaĵo kiu plene taŭgas por komencantoj, des pli bone, kiom pli troviĝas post ĝi gramatikaj komentarioj (franclingve verkitaj de S-roj A. Masselier kaj Emm. Robert). En la fino estas 1-paĝa greka fabelo « Pri la deveno de l'arta muziko ».

Pierre DELAIRE.

ELLERNU de d-ro F. Szilagyí — 112 — paĝa, grandformata, libro — eldonita de Literatura Mondo — havebla ĉe « Esperanto-Office » — prezo : 15 fr. fr. afrankite, por Francujo. Eksterlando : 17 fr. fr.

TRAFENDITA TURO de Th. Cart — eta 16 — paĝa broŝuro — vendoprezo : 1 fr. fr., prezo afrankite ne montrita — Kolekto de « Franca Aso-

## KURACADO PER LA KOLOROJ

Bordeaux, la 17-an de aŭgusto 1937.

Kara Sinjoro Christophe,

*Kelkajn tagojn post la konstato pri kiu mi skribis al vi en mia lasta letero, mi lokis en seninterrompeco, sur la harojn de la malsanulino — ĉiam sekrete de ŝi — kolorojn elektitajn inter la pluraj nuancoj de ĉiu el la sep fundamentaj koloroj, konforme al ŝiaj radiadoj.*

*Mi ĵus eksciis ke ŝia ĝenerala stato multe pliboniĝis, kaj ke ŝi ekleviĝas, kaj eĉ ekiras, kio ne okazis al ŝi de multenombraj monatoj.*

*Mi jam havis la okazon konstati, multfoje, al multaj personoj, la bonfarantan efikon de la koloroj, kaj precipe mi rimarkis ke la plej granda efiko estis akirata kiam tiuj-ĉi lastaj estis arigitaj laŭ indikitaj ordo kaj kvantoj.*

Bonvolu, akcepti, ktp...

D. CHICCA,

Inĝeniero,

58, Cours Georges-Clémenceau,  
Bordeaux (Gironde),  
Francujo.

## ABONU TUJ

## « RADIESTEZA GAZETO » N

DUOBLAN CELON HAVAS  
« RADIESTEZA GAZETO »

1) Propagandi RADIESTEZON per ESPERANTO.

2) Propagandi ESPERANTON inter la ĉiulandaj RADIESTEZISTOJ.

Por plenumi tiun celon kun plej granda sukceso, ĝi bezonas la helpon de ĉiuj bonvolaj ESPERANTISTOJ kaj RADIESTEZISTOJ.

« RADIESTEZA GAZETO » ne nur radiestezistojn devas interesi, sed ankaŭ radiestezo-amikojn.

La plej malkara, kvankam la plej riĉenhava el ĉiuj monataj esperanto - gazetoj estas

## NIA GAZETO

absolute sendependa  
organo eldonata de la franca  
ĉiutaga ĵurnalo  
« Eclairer de Nice »

Direktoro : Georges AVRIL

Petu senpagan provkzempleron !

## NIA GAZETO

29, avenue de la Victoire  
NICE (Francujo)

S-ro Jean AUBIER, bankoficisto, 36, venelle du Ponceau, Orléans (Loiret). FRANCUJO, dez. kor. kun esp. el ĉiuj landoj.

cio de Blindaj Esp-istoj » : Emma-nuel ROBERT, 5, rue Ravignan, Parizo (18<sup>e</sup>).

## ESPERANTO-OFFICE

(Esperanto-Oficejo)  
Francujo.

## EMILE CHRISTOPHE

« Estu Radiesteza  
Serĉisto »

Esperanten tradukis (el la franca lingvo), Pierre DELAIRE. — Libro 222-paĝa.

Enhavo. Kiamaniere oni uzas la vergeton kaj la pendolon. Nova metodo. Malsanoj kaj sanigoj. — Veterinara medicino.

Prezo afrankite : Francujo, 32 fr. fr.

Aliaj landoj : 34 fr. fr.

DU VERKETOJ  
DE PIERRE DELAIRE

L'Esperanto en douze leçons (Esp. en 12 lecionoj) — Oportuna franclingva lernolibro. Prezo: Francujo : 6 fr. fr. Eksterlando : 7 fr. fr.

Tu seras Esperantisto ! (Estu Esperantisto !) — Franclingva varbbroŝuro dediĉita al S-ro Jean Zay,

franca Ministro por Nacia Edukado. — Prezo : Francujo : 5 fr. fr. afrankite. Eksterlando : 6 fr. fr.

Ĉiujn mendojn sendu kun mono al S-ro, Pierre DELAIRE, dir. de Esp. Oficejo, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret), Francujo.

## ANONCETOJ

Unu linio : 5 fr. fr.

Ili devas esti antaŭpagitaj.

PENDOLO EMILE CHRISTOPHE, duoble uzebla, por la radiesteza kaj teleradiesteza serĉadoj. Oportuna kombino de malpeza pendolo (10 fr.) kaj de peza (70 gr.) en unu sola pendolo. Prezo afrankite, Francujo : 27 fr. fr., aliaj landoj : 30 fr. fr. Sendu mendojn kun mono al S-ro Pierre DELAIRE, dir. de Radiesteza Gazeto, 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) Francujo.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (fondita en 1907) eldonas luksan revuon, kiu estas nomita simple : « La Bulteno », ĝi enhavas interesajn kaj ilustritajn artikolojn pri ĉiuj sciencoj kaj industrioj. Provekzemplero estas sendota al ĉiu kiu ĝin petos al la ĝen. sekr. : S-ro M. D. DUPUIS, 56, rue de La Rochefoucauld, Paris (9<sup>e</sup>) Francujo. Aldonu 1 intern. resp. kup.

ILUSTRITANFALDPROSPEKTON pri Ĉeĥoslovakujo senpage sendas al niaj legantoj : Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Praha XIX Uraŝké 9.

X — a SOKOL-OLIMPIADO PRAHA 1938, ilustrita faldprospekto pri la festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnasta Asocio SOKOL, okazontaj en julio 1938, 8 pg. 15 x 10 cm. Senpage ricevebla ĉe : Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Praha XIX, Uraŝké 9.

S — roj Knut BERNSTROM, Villavagen 23, Upsala, Svedujo kaj Max DELAIRE (19 1/2 jara) 63, rue de Patay, Orléans (Loiret) Francujo, dez. kor. kun gesanoj de ĉiuj landoj.